

ESPERANTO

★ TRIUMFONTA ★

N-ro 29, 24. Aprilo 1921

Jurnalo internacia, universala, sendependa
eldonata de Teo Jung, Köln-Horrem (Germ.)

★ Eliras semajne. ★

Jam 405 Partoprenontoj por Praha (vidu p. 2).

Kial Esperanto?

Kiel neniu rajtas malpermesi al emuloj teorie diskuti pri ia pli bona aŭ pli bona estonta formo de la mondlingvo, tiel same neniu rajtas postuli de ni, konsciaj esperantistoj kaj sinceraj mondlingvanoj, en la praktiko forlasi la certan fundamenton de nia por la hodiaŭa tempo kaj la nunaj bezonoj tute taŭga kaj jam depost jardekoj elprova Esperanto, antaŭ ol la ideo mem de lingvo internacia ne estos venkinta, — forlasi ĝin por sekvi novajn sistemojn, kiuj ankaŭ ne estas perfektaj sed eĉ konstante ŝanĝataj. Sama postulo estus, se oni volus instigi nin vendi pretan, por niaj bezonoj sufiĉantan, kvankam ne tute komfortan domon, por aĉeti novan, eble pli komfortan, kiu ankoraŭ ne estas finkonstruita. Cetere, la efektiva plibonigo — ne ĉiu reformo estas plibonigo — de la reformistoj kompare kun Esperanto estas tiel sensignifaj, tiel malgrandaj, kaj la malplibonigoj — alia parto de la reformoj — estas tiel konsiderindaj, ke ni devus esti malsaguloj, se ni volus forlasi nian sekuran fundamenton por konfidi nin al domo, je kies muroj la konstruantoj ankoraŭ flikas kaj riparas.

Kaj kiu garantias al ni, se ni nun forlasas nian pretan domon por transloĝigi en alian — eble pli komfortan sed ne jam pretan — kiu garantias al ni, ke intence ne venos aliaj proponantoj al ni, kiuj kveran domojn ankoraŭ pli komfortajn?

Kiam nia ideo estas venkinta, tiam nia unua kaj plej grava tasko jam estos plenumita! Tiam estos ankoraŭ sufiĉe da tempo por transloĝigi en pli komfortan, tiam supozeble pretan domon, en veran lingvan palacon. Ne povus esti malutile jam nun fari la projektojn por tiu palaco, kiun ni volas okupi post atingo de la alto, al kiu ni celas; tio eĉ detenus multajn reformemulojn en nia mezo de flankaj vojoj. Sed en la praktiko ni nun devas ankoraŭ veni por atingi la altajn, kaj tion ni povos nur per plena unueco, per firma apogo al unu sola sistemo, kaj certe al tiu sistemo, kiu jam nun estas disvastiginta tra la mondo, kiu jam nun estas ne utopio, sed realaĵo, kiu jam nun multe utilas al ni, ĝiaj disceptoj kaj aplikantoj.

Mi ripetas: nia unua kaj ĉefa celo estas la **enkonduko de skriba kaj buŝa interkomprenilo**, por kiu la anoj de diversaj nacioj — nun disigitaj pro la lingva diverseco — povas facile

kaj senpene interkompreniĝi. Kaj tiun celon ni devas aspiri per la plej rekta kaj plej sekura vojo. Ĉu la ilo por la interkompreniĝo estas iom plimalpli perfekta, nun ne ludas gravan rolon. **Kiam la ĉefa celo estos atingita, la kampo fariĝos libera por reformoj kaj plibonigoj kiuj ajn.** Tiam ja la tuta homaro, ekkoninte la gravecon de la mondlingvo, jam okupos sin pri ĝi kaj anstataŭos la neperfektan, eble ne plu taŭgantan por la novaj bezonoj, malnovan lingvon internacian — nian nunan Esperanton — per nova, „plej perfekta“, eble sen- aŭ supernacia mondlingvo.

Ĝis tiam — ankaŭ tion mi ripetas — ĝis tiam nepre sufiĉos nia Esperanto en sia nuna formo, por kiu ni nun laboras, laboregas, klopodas, batolas, kies ideo niajn animojn entuziasmigis, aligas, nobligas, kies sukcesoj niajn korojn ĝojigas kaj feliĉigas, kiu donas al nia alie tiel banala vivo la riĉigan enhavon, la ĝustan komprenon...

Antaŭ dek-dekdu jaroj mi estis revema, meditema, nekontenta, stranga junulo. Mi evitis la homojn. Eliris malmulte, parolis ankoraŭ pli malmulte. Dumtage — ĉiutage mi havis tute mekhanikan laboron — min okupis revado, meditado, eĉ versfarado; vespere mi lernis, legis, muzikis; faris projekciojn kaj skizojn de konstruataj urbejoj; fondis en iu parto de l' tero regnojn kun urboj kaj vilaĝoj, vojoj kaj fervojoj; konstruis domojn, preĝejojn kaj palacojn; eĉ „kreis“ novan lingvon, intersanĝante diversajn literojn en mia patra lingvo, tiel ke rezultigis tute sovaĝa lingvaĵo. Kaj dumnokte mi ofte daŭrigis vole-nevole tiujn revojn, ili persekutis min en sonoĝo... Kelkfoje mi vizitis legejojn, iujfoje la operon...

Ĉio ĉi ŝanĝiĝis, kiam mi eklernis Esperanton. Tuj la granda ideo ekkaptis min, verŝis varmigajn radiojn de kompreno kaj ĝojo en mian mizeran, solecan animon. Jen ĝi trovis, kion delonge ĝi serĉis. Jen miaj revoj alprenis realan formon. Iom post iom tuta mia vivmaniero aliĝis. Ne plu mi evitis la homojn, ne plu mi revis pri sentulaj ĉar utopiaj ideoj; sed mian tutan pensaron mi koncentrigis je la unu granda ideo: la mondlingvo! Tro juna kaj sen influo ankoraŭ, sen sperto kaj sen kuraĝo, ne kuitimiĝinte al homoj, mi rezignis je aktiva partoprenado en la movado; sed ŝparis miajn fortojn ĝis la tempo, kiam mia aĝo estus progresinta, mia influo kreskinta, mia sperto kaj kuraĝo sufiĉaj por ekkomenci tian ioma ŝanco je sukceso la aktivan laboron por la kara ideo.

de la milito. Tamen unu franca politikisto post la alia diras: „Mi pagigos la obstinajn germanojn, mi marŝigos la francan armeon por prudentiĝi ilin.“ Sed marŝiginte la armeon ili trovos aron da malfacilaĵoj, ĉar sendube la okupado de la tuta Germanlando kostos poiare pli ol la poljaraj procentoj de la pagota sumego. Kion do fari?

Unue kompreni, ke la Versailles'a konvencio estas granda senŝanco eĉ el vidpunkto de profito de la venkintaj ŝtatoj. Tio okazas jam nun iom post iom; sed oni tute ne scias kion anstataŭi pro la Versailles'a konvencio. Tamen la solvo de tiu problemoj estas tre simpla. Ĝis nun Franclando kaj Germanlando similas al du malamiko, kiuj kunligite per ŝnuro staras sur mallarĝa trabo, kiu etendiĝas super profundan akvon. La unu havas ponardon en la mano, tamen li ne riskas mortigi la alian, ĉar tiam ambaŭ falus malsupren en la akvon kaj dronus. Sed kiam la du malamikoj interkonsentos la danĝero tuj ekfinos. Oni eble diros „neeble“. Sed kie volo, tie vojo. Anstataŭ la naciemal ŝovinistaj politikistoj oni elektu en la venkintaj kaj en la venkintaj ŝtatoj politikistojn kun esperantaj ideoj. La proponoj de tiu kongreso estus eble la sekvantaj:

Ĉar la malfeliĉo de la mondilito okazis per la agado de ĉiuj politikistoj de Eŭropo, kiuj laŭ Lloyd George faletis en la militon senkonscie, ĉar ne nur germanaj, sed ankaŭ anglaj, francaj, usonaj kanonoj detruis valoregion; pro tio oni devas dispartigi tiujn domojn je kiel eble multaj ŝtatoj, kvankam ankaŭ tiam ili preskaŭ ne estas tolerablaj. La malfeliĉa milito kunigis la sorton de Germanlando kaj Franclando; do ili estas devigitaj fariĝi unu ŝtato. Tiam Franclando tute ne

Jen tiu tempo ekestas, kaj mi ĝojegas, ke fine mia vivo ricevas sian plenan enhavon, ke fine mia forto fariĝas valora kaj fruktodona, ke fine mi ne plu bezonas kaŝi min sed povas libere kunlaboradi ĉe la granda kultura verko, kiun ni estas konstruataj sur la fundamento de nia kara Majstro.

Ne firme kredante je la fina triumfo de nia giganta entrepreno konvinki la mondon, neniam mi oferdonus mian tutan tempon, mian tutan laborokapablon al la ideo. Same kiel mil kaj mil de miaj samideanoj. Sed vidante la skismon levintan sian kapon, mi bedaŭras, ke ne regas unueco en nia movado.

Kial la skismo? Kial ne meti la ideon super la formon? Kial provi, per — eble bonintenca sed malutilega — antaŭtempa reformo detruji la jam pene atingitan sukceson, mi povas eĉ diri sukcesegon, kaj komenci denove?

Ĉu vi konscias, kion tio signifas: komenci denove! Tio signifas, ke tuta nia laborego, ĉiuj niaj penadoj kaj klopodadoj por nia ideo estis vanaj. Vana la verko de mil kaj mil fervoraj idealistoj, vanaj la sukcesoj de jardekoj, vanta la sonoĝo miljara de disigitaj popoloj je l' mesia lingvo! Tio signifas, ke la mondo estos pli malfidema ol iam, ke ĝi krios pri trompo kaj perfido! Tio signifas, ke en nia jarcento la ideo de lingvo interpopola jam ne estos realigebla, ke la „bela sonoĝo de l' homaro“ restos denove sonoĝo por cent jaroj! Tio signifas, ke ni ĉiuj estos rigardataj kiel mensoguloj, kiel sentaŭguloj, kiel utopistoj, kiel malsaguloj, kiel ridinduloj, kiel — kion mi scias!

Samideanoj de ĉiuj sistemoj! Ĉu tia estas via intenco? Ĉu efektive vi volas trompi la mondon? Ne, ankaŭ vi, idistoj; ankaŭ vi, esperantidoj, ne volas tian mizeran finigon de nia granda ideo!

Tial, mi diras, **fial: Esperanto!** Unueco estas necesega, unueco pri nia lingva formo, unueco pri niaj institutoj, unueco pri nia labormetodo, unueco antaŭ ĉio!

Do, lasu ni ĉiun disputon kaj reunigi en la praktiko je la sola lingva formo, kiu nun havas ŝancon por enkondukiĝi en antaŭvidebla tempo: je Esperanto!

T. J.

*) Tiu ĉi artikolo estas verkita antaŭ kelkaj monatoj. Intertempe la esperantidoj — kiel konate — jam forlasis la praktikadon de sia sistemo.

La Restarigoj.

(Antaŭ kelke da tempo ni ricevis sekvantan manuskripton, kiu — kvankam ĝia enhavo al multaj ŝajnos utopia — certe interese pro la originaleco de la ideoj esprimataj per ĝi. — RED.)

En la granda politiko nenio faras al la fakuloj tiom da cerbolaboro ol tiu-ĉi vorto. Precipe en Franclando grandaj kompleksoj kun florantaj urboj kaj ĉarmaj vilaĝoj estas detruitaj per la mondilito. Kie bonhavaj posedantoj antaŭe vivis, nun malĝojaj dezertoj etendiĝas. La franca registaro resumis ĉiujn damaĝojn kaj kalkulante atingis la gigantan sumon de preskaŭ tri cent miliardoj da frankoj. Sendube la franca ŝtato devas mediti pri la rekompenco de la enloĝiganto, kiu perdis dum la milito ĉiujn havaĵojn. La francaj ŝtatestroj scias bonege, ke la franca ŝtato neniam povus kolekti tiun sumon. Do ili trovis elturnigon, kiu vere nur estis teatra trompaĵo kaj en la efektiveco rapide estis perdita la tutan vivpovon — ili agis kiamaniere:

Kiam la germanaj delegitoj petinte pacon venis Versailles-on, ĉi tiuj estis devigitaj subskribi, ke nur Germanlando estis kulpaj je tiu terura mondilito kaj ke pro tio Germanlando ŝuldis kompensojn ĉiujn damaĝojn, kiuj devenis el la mondilito. Ni ne pritraktos en tiu artikolo la demandon pri la kulpo kaj supozos, ke la Versailles'ana politikistoj estas pravaj. Sed trankvile konsiderante la financon staton de Germanlando, oni ekvidos, ke ankaŭ ĝi neniam povos pagi tiun sumon, precipe post kiam tiu lando perdis la komercan ŝiparon, la koloniajn kaj riĉajn limregionojn, inter kiuj eble ankoraŭ partoj de Supra Silezio, kaj post kiam Germanlando estas tute ekspluata per la penadoj

bezonas armeojn por pagi Germanlandon, ĉar por la nova ŝtato estas memkomprenebla, ke la franca malfaciliga enloĝiganto de la detruitaj regionoj devas esti kompensata. Tiamaniere Germanlando pagos eble la duonon kaj Franclando la alian duonon. La pagado estos sendube severa, sed certa. Do la malfeliĉa enloĝiganto ne ricevos frazojn sed realaĵojn; ne ŝtonojn, sed panojn. La pagado estos certa, ĉar la nova ŝtato ricevos ankoraŭ pli da profitoj.

La franca ŝtato prokrastos la pagadon de la milita prunto ĉe Anglujo kaj Usono, kaj same Germanlando la pagadon de la milita damaĝo ĉe la aliaj ŝtatoj, ĝis kiam ĉiuj francaj samlandanoj ricevis siajn postulojn, tiam la nova ŝtato komencos la pagadon al Usono, Anglujo kaj aliaj ŝtatoj. Tiamaniere la pagadovo nek de Germanlando nek de Franclando estos trostreĉataj; la franca loĝantaro ricevos siajn postulojn kaj Usono ne bezonas pripensi, kiamaniere fari la grandan prunto por restarigi la aĉetforon de Eŭropo. Eble ĝis Usono kaj Anglujo ricevos sian monon, multaj jaroj pasos, sed neniam oni aŭdos en Germanlando. „Ni estas sklavoj de Francujo!“, kaj en Franclando la malfeliĉinta popolo ne diros: „Ni estas trompitaĵ“. En Svislando kunvivis francoj kaj germanoj samlandane kaj harmonie. Jam sub Karlo la Granda ili formis unu ŝtaton nomitan *Franklando*, kaj en la kruciaj militiroj la francoj kaj germanoj ambaŭ estis nomataj *frankoj*. Se oni disputus ĉe Parizo aŭ Berlino devus fariĝi la ĉefurbo, oni elektu Strasburgon kiel ĉefurbon, ĉar la francoj nomas ĝin francan kaj la germanoj germanan urbon.

Kiamaniere tia solvo ne restos problemo sed efektivego, mi eble pritraktos en alia artikolo.

XIII-a Universala Kongreso de Esperanto en Praha.

(31. julio ĝis 6. aŭgusto 1921.)

Oka Komunikilo.

Komitato. — Eksiĝis s-ro Bouška.

Fakan kunvenon por *virinoj* aranĝos f-ino instruinisto Nesmerakova, por *ĉastemuloj* s-ro Roskes, Hago.

Kotizo. — Vidu la VII-an komunikilon! Aligui antaŭ 1. VI. 1921 kaj pagu kotizon per viaj ŝtataj banknotoj sendotaj en rekomendita letero al la ĝenerala sekretario! La aligitoj bonvolu baldaŭ sendi kotizojn!

Krom la jam menciitaj en la VII-a komunikilo pagis la sekvantaj numeroj: 10, 12, 14—20, 40, 44, 54, 61, 65, 114, 126, 128, 131, 156, 157, 144, 146, 147, 152, 171, 172, 177, 180—183, 199, 200, 205, 213—233, 235—254, 256, 261—263, 265—284, 287—291, 293—301, 303—309, 312—327, 335—336, 341, 344, 345, 347, 348, 364, 365, 381—405.

Aligoj. — 180. S-ro Paffenholz, 181. S-ro Paffenholz (pli aĝa), 182. S-ro Heinz G. el Düsseldorf, 183. S-ro Hajek-Nusle, 184. S-ro Wiesenfeld-Warszawa, 185. S-ro Kosteletzky-Parnik, 186. f-ino E. Machackova, 187. f-ino R. Machackova, 188. S-ro Em. Jelinek, 189. S-ro J. Jelinek, 190. f-ino Štepankova, 191. S-ro Smetak, 192. S-ro Knourek, 193. S-ro Storch, 194. S-ro Pumr, 195. S-ro Sobischek, 196. S-ro Binova, 197. S-ro Mink, 198. S-ro Jelinkova-Hradec Kralove, 199. S-ro Tutsch-Praha, 200. S-ro Achillini-Genova, 201. S-ro Wendler-Pastetten, 202. S-ro Penkov-Mlecevo, 203. S-ro Popiliev-Gumušnik, 204. S-ro Stojnov-Svelevo, 205. S-ro Fitton-Skepley, 206.—207. Ges-roj Boubon, 208.—209. S-ino kaj f-ino Focké-Orléans, 210. f-ino Lecointe-St. Jean de Blanc, 211.—212. ges-roj Pilault-Orléans, 213. S-ro Aalderink-Amersfort, 214.—215.—216. familio Kudela, 217.—218. S-ro kaj f-ino Hoschek, 219. S-ro Beck, 220.—221. S-roj Stancl, 222.—223. S-roj Rebiček, 224. S-ro Wolf, 225.—226. ges-roj Eisler, 227. f-ino Neuzilova, 228. S-ro Blazek, 229. Freund, 230. f-ino Mala, 231. f-ino Limova, 232. f-ino Hanzlikova-Olomouc, 233. S-ro Tannenbaum-Wien, 234. S-ro Šimonek-Chicago, 235. S-ro Pech, 236. S-ro Pešek, 237. f-ino Janovcova, 238. S-ro Šnajdr, 239. S-ro Hrabak, 240.—241. ges-roj Kaiser, 242. S-ino Travníčková, 243. f-ino Travníčková-Plzen, 244. S-ro Krampl-Leina, 245. S-ro Jira, 246. f-ino Šteklava-Plzen, 247. S-ro Jankovec-Chotimer, 248. S-ro Priban-Plzen, 249. S-ro Pohasi-Hago, 250. S-ro Heš, 251. S-ro Lukeš, 252. S-ro F. Kovanda, 253. S-ro K. Kovanda-Doubavka, 254. S-ro Laquer-Budapest, 255. S-ro Doerfler-Mühlendorf, 256. S-ro Hoffmann-Danzig, 257.—258. ges-roj Laurans, 259.—260. ges-roj Esser-Rotterdam, 261. S-ro Kalimus-M. Ostrava, 262. S-ro Fridrich-Brno, 263. S-ino Johne-Potschappel, 264. S-ro Huenlich-Dresden, 265. S-ro Amort-Danzig, 266. S-ro Bernhard, 267. S-ro Nelz, 268. S-ro Donien, 269. S-ro Schenkel-Friedrichsthal, 270. S-ro Rehak-Kopidno, 271. f-ino Cechova-Kerharice, 272. f-ino M. Vašičková, 273. S-ro Vašiček-Ustí n. O., 274.—275. ges-roj Nemec-Karlovy Vary, 276. S-ro Giesswein, 277.—278. ges-roj Tolmaj, 279. S-ro Pados, 280. S-ro Major, 281. S-ro Paszty, 282. S-ro Wiesinger, 283. d-ro Racz, 284. f-ino Lederer, 285.—286. ges-roj d-ro Lorand-Budapest, 287. S-ro Socha-Zabreh, 288. S-ro Kincl-Sušice, 289. f-ino Fridichova-Košický, 290. S-ro Verner-Praha, 291. S-ro Soboňka-Nova Ves, 292. S-ro Neubert-Kissingen, 293-294. ges-roj Gottgetreu-Hannover, 295. S-ro Scholze-Reichenberg, 296. S-ro Mieler-Breslau, 297. S-ro Meagher-Dublin, 298. S-ro Liljemark-Gevle, 299.—300. ges-roj Kubasek-Plzen, 301. S-ro Roerscht-Dresden, 302. S-ro Meijer-Heerewarden, 303. S-ro Novak, 304. S-ro Gross, 305. S-ro Stary, 306. S-ro Hahn, 307. S-ro Erhart, 308. S-ro Pavlik, 309. S-ro Kolar-Plzen, 310.—311. ges-roj Šilha-Brno, 312. S-ro Haase-D. Ruzdol, 313. S-ro Kučera-Kladruhy, 314. S-ro Garcia Hernandez-Madrid, 315.—316. ges-roj d-ro Fousek-Prelouč, 317. f-ino Moravkova-Praha, 318. S-ro Blum-Krasne, 319. S-ro Krofta-Strašice, 320. f-ino Janalíkova, 321. f-ino Minarikova, 322. f-ino B. Chytilova, 323. f-ino R. Chytilova, 324. S-ro Chvatil, 325. S-ino Müllerova-Bystrice p. H., 326. f-ino Dragounova-Olomouc, 327. f-ino Brabčova-Kromeriz, 328. f-ino Semerakova, 329. f-ino Reichlova, 330. f-ino J. Čizkovska, 331. f-ino R. Čizkovska, 332. f-ino E. Čizkovska-Praha, 333. S-ro Kappelmann, 334. S-ro Grüntner-Dresden, 335. S-ro Larrea, 336. S-ro Elizondo-Bilbao, 337.—338.—339.—340. familio Kavan-Plzen, 341. S-ro Mikš-Nusle, 342.—343. ges-roj Applebaum-Liverpool, 344. f-ino Havranekova-Prostejov, 345. S-ro Spurny-Kyjov, 346. S-ro Roskes-Hago, 347. S-ro Barta-Proseč, 348. S-ro Barial-Ujhartyan, 349. S-ro Kopecky-Rosice u. P., 350. S-ro Daniel, 351. S-ro Wagner, 352. S-ino Kroužilova, 353. S-ino Cvetlerova, 354. S-ino Veverkova, 355. S-ino Petrova, 356. S-ro Doucek, 357. f-ino Vondrova, 358. f-ino Vamberova, 359. f-ino Kratochvilova, 360. f-ino Niesslova, 361. f-ino Antoňova, 362.—363. f-inoj M. kaj R. Vavrinova, 364. S-ro Meazzini-Badiola, 365. S-ro Radek-Turnov, 366. f-ino Gaisbauerova-Vizovice, 367. f-ino Brezlikova, 368. f-ino Kilarova, 369. f-ino Grmelova, 370. f-ino Holibkova, 371. f-ino Mikšikova-Bystrice, 372. S-ro Jelinek-Ruzomberk, 373. S-ro Murath, 374. S-ro Hrabak, 375. S-ro Kratochvil, 376. S-ro Bloch, 377. S-ro Oberst-Brüx, 378. S-ro Kaupe-Hago, 379. S-ro Amos,

380. S-ro de Ejszaky-Cluj, 381. S-ro Sappl-Graz, 382. S-ro Ranft-Dresden, 383. S-ro Bouška, 384. f-ino Kvetonova-Vršovice, 385. S-ro Kasal-Plzen, 386. S-ro Spire-Lizhorod, 387. f-ino Dandava-Zizkov, 388. S-ro Kozak-Dobzy, 389. S-ro Svoboda-Praha, 390. S-ro Brich-Bubeneč, 391.—392.—393. familio d-ro Filippetti-Milano, 394. Markizo Montezomolo-Castiglione, 395.—397. familio Julia-Ceret, 398. S-ro Arrieu-Jeysnes, 399. S-ro Dones-Montrejan, 400.—404. familio Stejskal, 405. S-ro Netušil-Smichov.

Donacoj. — S-ro Tutsch 15 K., S-ro Fitton 20 š., Esp. Grupo Olomouc 100 K., S-ro Tannenbaum 175 austr. K., S-ro Goitgelre 18 mk., paroĥ. Kučera 100 K., lernantoj de ing. prof. Kroužil 1000 K.

Deponita mono. — S-ro Degenkamp 1250 K., S-ro Faulhaber 2000 K., S-ro de Boer 2000 K., S-ro v. Doorne 3000 K., S-ro Laurans 4500 K., f-ino Boon 1247 K., S-ro Tannenbaum 250 K., S-ro Thiebault 397 K. 13 h, S-ro Jung 53 K. 10 h, S-ro Molnar 100 K., S-ro Grenkamp 90 K.

Garantia fundo. — 8. S-ro Vinzent 100 K., 9. S-ro Thiebault 397 K. 13 h, 10. S-ro Alonso Sanz 100 K., 11. Esper. Societo Olomouc 300 K., 12. S-ro Molnar, 13. S-ro de Wolf, 14. Esper. Klubo Plzen, 15. S-ro Kavan, 16. S-ro Applebaum, 17. S-ro Grenkamp po 100 K.

Prezoj de la biletoj por fervojaj linioj. — Vidu la specialan tabelon en hodiaŭa numero de „Esperanto Triumfonta“.

Pasportoj. — Por la veturo al Praha kaj-reveno estas necesa pasporto, pretigita de la poliestroje aŭ alia kompetenta ŝtata ofico, visita de la ĉeĥoslovaka ambasadejoje aŭ konsulejoje kaj de la konsuloj de ĉiuj traveturotaj ŝtatoj.

Adreso por aligui kaj prikonsiliga korespondado: Augustin Pitlik, Praha 11, Nerudova 40.

Rimarko. — Oni ne forgesu aldoni por respondo aŭ respondukuponon aŭ afrankon en neuzitaj naciaj poŝmarkoj!

Por la Loka Kongresa Komitato: Augustin Pitlik, ĝen. sekretario.

Veturprezoj al Praha.

(Laŭ komunikilo de la Loka Kongresa Komitato.)

Praha-Sob-Budapest 2. klaso 168 Kč (kronoj ĉeĥaj) kaj 106 kh (kronoj hungaraj), 3. kl. 84 Kč kaj 73 kh.
Praha-Gmunt (Gmünd)-Wien-Graz 2. klaso 84, 80 Kč kaj 185,60 kaj (kronoj aŭstraj) kaj 248,40 kaj, 3. kl. 42,20 kaj kaj 91,80 kaj kaj 124,20 kaj.
Praha-Cheb (Eger)-Kufstein-Brenner-Trento 2. kl. 97,60 Kč kaj 110 m (markoj) kaj 129,60 kaj kaj 55,80 l (liroj), 3. kl. 48,80 kaj kaj 67 m kaj 64,80 kaj kaj 18,90 l.
Praha-Spielfeld-Beograd 2. kl. 97,20 Kč kaj 599,80 kaj kaj 226,50 d (dinaroj), 3. kl. 48,80 kaj kaj 199,90 kaj kaj 113,25 d.
Spielfeld-Longatico-Trieste 2. kl. 79,50 d kaj 26,45 l, 3. kl. 39,75 d kaj 14,10 l.
Brenner-Roma 2. kl. 157,60 l, 3. kl. 71,50 l.
Brenner-Genova 2. kl. 106,25 l, 3. kl. 53,20 l.
Praha-Cheb-Appenweier-Basel-Bern 2. kl. 179,28 m kaj 11 f (frankoj svisaj), 3. kl. 111,50 m kaj 7,50 f.
Praha-Strasbourg-Lyon 2. kl. 77 f kaj 55,80 f, 3. kl. 47 f kaj 22,75 f.
Praha-Paris 2. kl. 381,15 f, 3. kl. 155 f.
Praha-Decin (Tetschen)-Aachen-Bruxelles 2. kl. 68,80 Kč kaj 211,20 m kaj 17 f, 3. kl. 34,40 Kč kaj 126 m kaj 10 f.
Praha-Decin-Saizberggen-Amsterdam 2. kl. 63,80 Kč kaj 172,60 m kaj 104,00 gn (guldenoj nederlandaj), 3. kl. 34,40 Kč kaj 102,40 m kaj 6,80 gn.
Praha-Berlin-Hamburg 2. kl. 68,80 Kč kaj 145 m, 3. kl. 34,40 Kč kaj 89 m.
Praha-Boxtel-London 2. kl. 68,80 Kč kaj 194,40 m kaj 37,50 gn, 3. kl. 34,40 Kč kaj 115,70 m kaj 35,20 gn.
London-Calais-Strasbourg-Cheb-Praha (Orient Express) 1. kl. 561 f, aŭ 14,20 sterl. pd.
Praha-Berlin-Rostock (Kopenhago) 2. kl. 68,80 Kč kaj 77 m kaj 84 m, 3. kl. 34,40 Kč kaj 45 m kaj 31,80 m.
Praha-Sassnitz-Warnemünde (Stockholm) 2. kl. 68,80 Kč kaj 87,60 m kaj 35,20 m, 3. kl. 34,40 Kč kaj 37,60 m kaj 35,20 m.
Praha-Leipzig-Frankfurt 2. kl. 68,80 Kč kaj 50,80 m kaj 95 m, 3. kl. 34,40 Kč kaj 30,40 m kaj 55,80 m.
Praha-Strasbourg-Paris-Narbonne-Perignan (Barcelona) 2. kl. 77 f kaj 71 f kaj 159,20 f kaj 8,90 f, 3. kl. 47 f kaj 45 f kaj 88,55 f kaj 5,65 f.

Organiza de la Budapesta Postkongreso.

La organiza komitato de la Postkongreso en Budapeŝto fine fondiĝis per la estraroje de la landa societo kaj laboristaj grupoj. Ili kunvenis en loĝejo de s-ano Laquer kaj konsentis, ke oni povas nur kune aranĝi la postkongreson, por kies sukceso oni devas kuni laboroj. La definitiva membraro de la organiza komitato ne estas ankoraŭ preta, sed sekretario adreso restas A. Laquer (Budapeŝto VII, Király u. 57/II).

La kongreso okazos la 9-an kaj 10-an de aŭgusto tiamaniere, ke la prahaj kongresanoj forveturante dimanĉe el Praha povas post belega ŝipveturo sur la Danubo la 8-an lunde vespere alveni en Budapeŝto kaj partopreni la konatigan vesperon.

Antaŭtagmeze estos kunsidej kaj rigardo de la urbo, komunaj tagmanĝoj, posttagmeze kunsidej kaj ekskursoj ŝipaj aŭ piedaj, vespere koncerto kaj teatraĵoj. Definitiva programo espereble baldaŭ aperos. La laboristaj grupoj aranĝos ankau apartan esp. laboristan landan kongreson!

Certe estas en la nuna epoko iom mirinde, ke laboristaj grupoj kune laboras kun tiel nomata „burĝa“ societo, sed nia movado estas pli malforta, ol ke oni povu ion atingi sola kaj la celo estas komuna. Cetere hodiaŭ la burĝaro plejgrandparte estas tiel ruiniginta, ke ĝiaj celoj kaj ideoj devus esti la samaj, kiel de la manlaboristoj, kaj ne estas laŭcelo, ke ili iras ĉiam sur apartaj

vojoj eĉ pli akirigante la diferencojn. Cetere la nefidemo kaj retenemo de la laboristoj kontraŭ ĉio, kio ne venas de „manlaboristo“ kaj la „sinfor-eca“ konduto de la burĝaro iom komprenigas, ke la kunlaboro estas vere tre malfacila inter tiuj homgrupoj, kiuj se iam komprenus unu la alian, akceptante la fakcionojn de la alia sen envio kaj nefido, povus certe transformi nian hodiaŭan mondon en mondon de homaranoj. Ŝajne por momento tiu ĉi ideo venkis inter la budapeŝtaj esperantistoj, kiam ili decidis kune labori por la kongreso! Espereble ilia konkordo restos ĝis la sukceso kaj eble pruvos, ke oni ne bezonas tri sur apartaj vojoj por komunaj celoj kaj ke, kie ŝajne ne estas komuna ilia celo, ĝi devus esti komuna!

Eksterlandaj Samideanoj! Helpu la sukceson de la postkongreso en Budapeŝto! Aligui kaj sendu helpmonojn, partoprenu per ia programpunkto je la internacia koncerto, vizitu la hungarajn samideanojn!

La japana delegito al la XIII-a.

Por reprezenti la japanajn samideanojn ĉe la Kongreso de Praha, s-ro Juro Narita, komitatano de propaganda fako de Japana Esp. Instituto, forveturis la 18. febr. sur „Tamba-maru“ el Jokohama.

Nordokcidentgermana Esperantista Kongreso en Harburg a. E.

okazos la 4-an kaj 5-an de majo (ĉieliron). Jam multaj samideanoj anoncis sian partoprenon. Alt-ranguloj de la urbo ĉeestos la kongreson, kiu estas malfermata la 4-an, vespere, per publika soleno. La labora kaj amuza programoj estas tre ampleksaj, ekz. okazos Esperantaj horkantoj, ekskurso en la fame konatita „Haacke“, delegitkunveno de „Nordalbinga Esperanto-Ligo“, kunveno de G.L.E.A. — La kongreskartoj kostas nur 5 mk. (3 markoj por familianoj). Ĉiujn informojn kaj aligojn oni adresu al la Kongresa Komitato, s-ro P. Hübner, Harburg a. E., Reeseberg 56

8. Internaciaj Floraj Ludoj.

La komitato de la Okaj Internaciaj Floraj Ludoj sciigas, ke la nunjara festo de „Floraj Ludoj“ okazos en Girona (Hisp.) dum la IX-a Kongreso de Kataluna Esp. Federacio (15.-17. okt.).

La ordinaraĵaj temoj estas (krom traduko) de la kataluna lingvo) originala versajo prikanatita amon kaj originala proza verko pri amo, ĉiuj en Esperanto. La premioj konsistas en valoraj libroj el la esp. literaturo (d-ro Nüchter, Albrecht Dürer; A. Mickiewicz-Grabovskij, Sinjoro Tadeo). Krome ĉiu laireto ricevos diplomon.

La eksterordinaraj temoj estas:

1. Premio de Deputita Moŝto d-ro Narcis Pla i Deniel, konsistanta el 100 pesetoj, al la plej bona verko priskribanta popolan tradicion.

2. Premio de la Grupo „Semo“ de „Ateneu Enciclopedic Popular“: 25-p-toj al plej bona traduko de la artikolo de D. Marif i Juliá „La Patria Universal“.

3. Premio de la grupo „Barcelona Stelo“: 50-p-toj al plej bona teatraĵo taŭga por propagando.

4. Premio de la societo „Nova Sentio“: 50-p-toj al plej bona versajo adaptebla je muziko, inspirita laŭ la „inerna ideo“. Ĝi devos konsisti el 2 strofoj enhavantaj 12 liniojn ĉiu.

Aliaj temoj kaj premioj estas promesitaj.

La manuskriptoj devas esti ricevitaj antaŭ la 15. aŭgusto ĉe la sekretario s-ro Estanislau Pellicer (Carme 30, Barcelona). Oni devas aldoni devizon kaj sendi en koverto fermita, kiu portos la saman devizon, la nomoj kaj adresoj de la verkinto. Manuskriptoj ne estos resendataj. Membroj de la ĵugonataro estas s-roj Kühnl, prez.; Estanislau Pellicer, sek.; d-ro Josef Casanovas; Josep Grau; Julio Mangada kaj Teo Jung. Ili ne partoprenos en iu konkurso. La verdikto estos publikigata en la esp. gazetaro.

Esp. Infanifesto.

Antaŭ nelonge okazis en Briesnig apud Dresden (Germ.) esp. infanifesto. En granda salone kunvenis ĉ. 350 geknaboj el Dresden kaj ĉirkaŭaĵo. La ĝelernantoj deklamadis multe da esperantajo. La ĉeestantaj gastoj aŭskultis kun granda ĝojo kaj sciigis tiamaniere, ke Esperanto estas vere uzebla kaj facile elernebla lingvo. Ĝis la malfrua vespero la ĝelernantoj ĝojis pri la dana homareco, kiu ebligis la ĝajan feston, kaj pri la belaj gajnajoj de la lotado. La prezidanto, instruisto Sohrmann el Weimhölta, de la Germ. Esp. Instr. Asocio salutis la ĉeestantojn esprimante la esperon, ke la lernantoj restu fidelaj al nia movado. Ĉiuj antaŭlaboroj por tiu ĉi bela festo faris la Dresdena Esp. Instruistaro kaj la sama sekca unuigo, kiuj ambaŭ fervorege propagandas inter la instruistoj.

Esperanto kaj bulgaraj instruistoj.

En Sofia estas malfermitaj kvinmonataj kursoj por progimnaziaj instruistoj. En tiuj kursoj, kun 80 partoprenantoj, estas enkondukita deviga instruado de Esperanto. Instruanto estas la vicprezidanto de BES, s-ro At. D. Atanasof. Bulgaraj esperantistoj dankas pro tio al la ministro de popola instruado s-ro St. Omarĉevski, kiu per tio denove pruvus sian progresemon.

Telegramo

n-ro 755, de l' 16-a de marto 1921.

(Traduko.)

Sinjoro Ĝenerala Direktoro
de l' Ĉeĥoslovaka Telegrafo.

Mi havas la honoron sciigi vin, ke mia Ad-
ministracio tute konsentas pri la modifo de l'
teksto de la paragrafo 3 de l' artikolo 7 de la
Internacia Regularo por akcepti la lingvon „Esp-
eranto“ en la internacia korespondado kiel klaran
lingvajon, kio jam okazas depost 1906 en la interna
korespondado de mia lando.

(s) A. Penido,
Ĝenerala Direktoro
de l' Brazilia Telegrafo.

Franca Gazetaro pri Esperanto.

En la franca gazetaro aperis multaj favoraj
artikoloj okaze de la decido de la Pariza Komercia
Cambro.

La „Bulteno de la Franca Komercia Cambro
en Svedujo“ (maria n-ro) enhavas tre bonan arti-
kolojn de sia pariza korespondanto.

„La journée industrielle“ de 7. IV., la plej grava
komercia tagjurnalo, enhavas konversacion kun
s-ro Baudet, prezidanto de la komisiono pri L. I.
en la Pariza Komercia Cambro.

„L'Ère nouvelle“, ĉiutaga gazeto en Paris, de
3. IV., enhavas favoran ĉefartikolon „L. I.“ de
s-ro Justus Godart, deputito kaj prezidanto de la
parlamentara esp. grupo.

En „L'Avenir“, ĉiutaga en Paris, du tre favoraj
artikoloj de ĝia direktoro s-ro Chaumet, deputito.
Liaj simpatioj estas de pli gravaj, ke li deklaris
publike la 17. II. dum la parolado de prof. Richet
pri Esp. en „Le Cercle Commercial et Industriel
de France“ en Paris, ke kiel prezidanto de la
„Marista Ligo“ („Ligue maritime“) li sendos cirku-
leron pri Esp. al ĉiuj lernejaĵ sektoj de la ligo.

Li promesis ankaŭ proponi al la franca parlamenta
komitato pri komercio (kies prezidanto li estas)
rezolucion por Esp. instruado prezentitan al la
Internacia Kongreso en Lisbono.

Aliaj artikoloj en „Les échos de l'exportation“,
semajna grava komercia ĵurnalo en Paris.

„Le Commerce et l'Industrie“, monata revuo
en Paris, enhavas 18-paĝan stenografian raporton
pri la pri-esperanta parolado de s-ro Richet en
„Cercle Commercial et Industriel de France“ sub
la prezido de prof. Berthelot, kaj de aliaj eminentuloj.

En Béziers (Suda Francujo) la loka sekcio de
la „Ligo por la rajtoj de homo kaj civitano“ vo-
ĉonis por Esp. rezolucion kaj donacis al la loka
grupo 50 frankojn.

„Le Négoce“, la ĵarlibro de la Universa
Komercia Muzeo (konstanta foiro, uzanta Esp.),
enhavas Esp. subtitolojn de ĉiu rubriko kaj multajn
Esp. anoncojn.

Laboristaro.

WARSAWA (Pol.). La esp. societo „Laboro“,
lama sekcio de Proletaria Klubo, nun reorganiza-
ĝas kiel memstara societo. Fondintoj estas:
parlamentano Kazimierz Dobrowolski, urba kon-
silanto Tomasz Wojciechowski kaj Roman Kensiscki.

Esperantistaj Sportistoj!

Ni intencas eldoni novan esperantan revuon
sub la titolo de *Sport-Revuo*. En ĉiuj sportistaj
centroj de la mondo ni bezonas kunlaborantojn,
kiuj sendus regule raportojn tradukitajn el la nac-
lingvaj sport-ĵurnaloj. Tiamaniere nia revuo
prezentus ĉiam plej bone la statojn de la sport-
movado sur la tuta mondo. Por kiel eble plej
baldaŭ realigi ĉi tiun aferon, ni petas urĝe ĉiujn
geamikojn, kiuj deziras subteni per abono la
revuon, sciigi nin pri sia intenco per simpla poŝ-
kartito, ke ni proksimume sciu la nombron de la
abonantoj. Se ni ricevos la necesan nombron,
ni tuj eldonos la Revuon. La korespondantoj
ricevos senpage la revuon kaj la redakcio pagos
al ili la poŝtajn elspezojn.

Ni petas plue ĉiujn esperantajn gazetojn bon-
volu repressi ĉi tiun alvokon.

UNIVERSALA SPORT-LIGO.

La ĝen. sekretario:

S-ro Stefano Pedrazzini,
Locarno (Svisio).

Sporto.

Sestaga Vetciklado en Chicago.

La rezultato estas: 1. Madden-Magin 985
poentoj 3511,514 km; 2. Hill-Kockler 807,5 pt.;
3. Lorenz Weber 699,5 pt.; 4. Rielens-Degraeve.

Ŝako.

La tria venko de Capablanca.

En la ŝakturniro pro la mondmaŝtreco en
Habana d-ro Lasker malsukcesis en la 11-a
rondo. Per tio Capablanca gajnis la trian venkon.
De 24 rondoj estas 8 nulaj, 3 gajnitaj de Capa-
blanca kaj 13 ankoraŭ ludotaj.

Piedpilko.

La unua ludo de kolonia sport-unuigo post la
milito en Holando, la ludo de „K. S. 99“ kontraŭ
„Vilene“ Arnhem, finis per venko de la kolonianoj
6:2 (duontempo 2:1).

Kelkmil da urbanoj de Kremona (Italio) rezolucias por Esperanto.

La 10-an de aprilo la Kremona Esperantista
Grupo organizis solenan kunvenon en Teatro
Ponchielli (la plej vasta de la urbo).

Ceestis kelke da miloj da Kremonanoj el ĉiuj
klasioj kaj partioj kiuj varme aplaudis A. Mandelli,
prez. de Kremona Esp. Grupo, d-ro A. Filippetti,
urbestro de Milano, komandanton A. Alessio kaj
pastran moŝton prof. Caroli.

Oni voĉdonis unuanime jenan tagordon: „La
popolo de Kremona solene kunveninta en Teatro
Ponchielli aliĝas Esperantismon kaj bondeziras
baldaŭnan enkondukon de Esperanto-instruado en
la publikaj lernejoj.“ Tre favora estas la urbestro.

Kroniko.

BERLIN. En la lasta kunveno la prez. Ludw.
Schiff nekrologis pri la subita morto per akcidento
de nia nelacigebla samideano Stubenrauch. 71-
jara, ŝi estis vera esperantistino ĝis la lasta mo-
mento de ŝia longa vivo. La kunveno honoris
ŝian memoron ekstarante. Tiam s-ro prof. Julius
Glück parolis elokvente pri la Krakova mond-
kongreso kaj invitis al la Praga kongreso. Li
parolis en la venonta kunveno de la Grupo la
2-an de majo en Augusta-lernejo pri la interesa
temo: La diversaj metodoj de propagando. Ĉiuj
gesamideanoj estas invitataj urĝe, ĉar oni pridis-
kutos la organizadon kaj esp. propagadon en
nia ĉefurbo. Oni aranĝos kursojn perfektigajn,
senkostajn, precipe ekzercedon en flua parolado
por la kongresanoj al la Praga mondkongreso.

(Sr.)

FRANKFURT a. M. Kartela kunveno de la
laborista, loka kaj blindula grupoj decidis kon-
centrigi la fortojn por plejeble akceli la progreson
de la afero.

Por reorganizi la lokan grupon denova ĝene-
rala kunveno estas aranĝita. La grupo daŭrigos
kunveni en Polyglott-Club, Goethestr. 10, lunde je
8 h. Estraro: prez. kaj sekr. Rob. Kreuz, kas.
H. Fricke, kunsid. Kuchler, Hummel, bibliot. Hast.
La 4-an de aprilo s-ro saneca koŝs. d-ro med.
H. Fulda parolis pri „Esperanto kaj la scienco“,
s-ro Kreuz pri „Esperanto en la praktiko“. Al la
propaganda vespero deklamo kaj lingvokompara
konversacio estis kunligitaj. Nova kurso komencis.

Esperanto-Oficejo estas: Polyglott-Club,
Goethestr. 10 kaj K. Greuling (librovendejo) Alte-
gasse 51.

SZERENCs (Hungario). La Miskolc'aj ĝe-
samideanoj klopodas organizi, sub gvidado de la
delegito de UEA, per propagandvojaĝoj la esp.
movadon en tiuj hungaraj urboj, kie ĝi ankoraŭ
ne estas sufiĉe forte enradikiĝinta. La celo de
la unua vojaĝo estis la urbo Szerencs (40 km
distanco de Miskolc, 10 000 loĝantoj), kie la 9-an
de aprilo pli ol 20 Miskolc'anoj faris sukcesplenan
propagadon dum mallonga prezentado, ankaŭ
per solokanto, solodanco, violon- kaj fortepianludo.
Poste ges-roj Altmann, gepatroj de s-anino Marta
Altmann, malavare gastigis la ekskursantojn, kiuj
pasigis la tutan nokton en ĉi tiu korega familia
rondo, kaj nur la sekvantan tagon antaŭtagmeze
ili revojaĝis Miskolc'on kunportante kaj verŝajne
ankaŭ laŝinte bonajn primemorojn pri la sukces-
inta festo, kies bonajn efikojn la Szerencs'a esp.
movado eble baldaŭ konstato.

Tra la Mondo.

Internacia kongreso de transportlaboristoj estas
malfermita lastan lundon en Basel.

La konata germano eldonisto August Scherl
morfis 72-jara en Berlin.

Laŭ „Times“ la konsilantaro de la universitato
Manchester invitis prof. Einstein, okaze de
lia baldaŭna vizito al Anglujo prelegi ĉe la un-
versitato. Einstein akceptis la inviton.

Dola ministro de l' eksteraj aferoj, princo Sapieha,
vizitis al Paris, London kaj Roma, por atingi
decidon favoran por Polio en la suprasilezia
problemo.

Laŭ sciigo de „Chicago Tribune“ eksprezidanto
Wilson intencas fariĝi advokato.

La unua popoldenombro de japana
imperio okazigita la 1. okt. 1920 rezultigis
por la tuta imperio 77 milionojn da enloĝantoj
(Japanto 36 mil., Formosa 5 1/2 mil., Koreujo
17 mil. kaj Sahalin 105 765). Estis 38 922 457
viroj kaj 38 085 073 virinoj. Plej granda urbo
estas Tokio kun 2 173 162 enloĝantoj, Osaka
1 252 972, Kobe 608 628, Kioto 591 305, Nagaja
429 990 kaj Jokohama 422 942.

Parolejo.

69.

Rilatas al 68.

Mi tute ne konsentas, ke vi pilmalgrandigu la formaton.
La formato de „Esperanto“ de UEA estas por via gazeto
tro malgranda. Ĝi havu la formaton de vera taggazeto!
Ĉu mi estas prava? (W. W., Neukölln.)

70.

SAT kaj RES.

Kara redaktoro! Esp. Laboristo dispartas la sciligon,
ke „Liberiga Stelo“ volas SATigi per la SAT-anigo per via gazeto
tro verdugularo, kromnie Sennacianca Asocion Tui-
mondan.

Ni, rumaniandaj samcelanoj, ankaŭ estas bonfaramaj,
kaj por RES-anigi la rumaniandan semideanon, ni klopodas
focdi Rumaniandan Esperanto-Societon. (A. C.)

Samideaneco.

Novaj donacoj por malsatantaj infanoj
de Budapest.

H. J. Ahlers, Amsterdam	2960 hung. kr.
L. Feuillebois & A. Rivier, Algier	1800 „ „
E. de Wolf jr., Haarlem	2704 „ „
J. W. M. Engelbregt, Rotterdam	280 „ „
S. F., Oppeln (mk. 20)	105 „ „
Sumo	7859 „ „

Gazetaro.

MEMORIAL de Ingenieros del Ejército. Madrid, jan. 1921.
Ampleksa ilustrita revuo, tuta libro, kun multaj interesaj
artikoloj en hispana lingvo. Interalie la artikolo pri la
relativeca teorio de Einstein represita el ET n-ro 3/4.

MESSEZEITUNG (Foirgazeto) Reichenberg, Ĉeĥoslovakio,
10. aprilo.

Grava komercia gazeto kun amaso da anoncoj. Re-
komendinda al komercistoj kaj industristoj.

O PRIMEIRO DE JANEIRO. 6. marto. Porto (Portugallo),
rua S-a Catarina.

Grandformata ĵurnalo, enhavas recenzon pri la n-ro 21
de ET.

Recenzejo.

LIBROJ.

FOIRO DE PARIS. Esperantlingva prospekto 4-paĝa
ilustrita pri la Foiro de Paris (10-25. majo 1921), ofi-
cejo: Paris, 8 Place de la Bourse. — La Foirkomitato
korespondas per ĉiuj lingvoj, sed speciale per franca
lingvo kaj Esperanto.

KÖLN. Gvidlibreto tra Kolonio. 8 paĝa, kun plano kaj
kovrilo. Eldonita okaze de la Revela Kongreso en Köln.
Havbla kontraŭ 2 germ. mk. aŭ 4 resp.-kup. de Revela
Oficejo, Köln, Germ., Hohestr. 26 (Junker).

GAZETOJ.

AMERIKA ESPERANTISTO. Marto.

Kun multaj novaĵoj ĉerpitaj el la eŭropa esp. gazetaro.
Speciale interesaj la rimarkigoj „pri diplomatia vortaro“.

BELGA ESPERANTISTO. Jan.-febr.

Ampleksa kalendaro de 36 kaj 8 paĝa. Kun multaj artikoloj,
kiujn ni plejparte jam legis ĉu en „Nia Folieto“ ĉu en
aliaj esp. gazetoj.

ESPERANTO PRAKTIKO. Aprilo.

Kun bonege redaktita enhavo. Ni tre esperas, ke la
letero de Onklo Tobias al s-ro Tili estas la lasta. Personaj
polemikoj ne havu lokon en niaj gazetoj.

ESPERO KATOLIKA. Aprilo. La numero vidigas multan
interan laboron en loka kaj ĝia filio.

FRANCA ESPERANTISTO. Aprilo.

Kun la raporto de s-ro Baudet el la Pariza Komercia Cambro,
en originala teksto kun apuda esp. traduko. — Raporto
de la loka organiza komitato pri la X-a kongreso (kial
ne en esp. lingvo?). Prezoj de la vojaĝo de Paris al
Praha kaj returne. — Noto pri la morto de d-ro Noel en
Nancy, tradukinto de diversaj verkoj. — Listo de la francaj
grupoj, el kiuj nur parto anigis al la Societo Franca por
la Propagando de Esperanto.

HISPANA ESPERANTISTO. Marto.

La numero estas speciale interesa, ĉar ĝi enhavas belajn
ilustraĵojn kun klarigaj tekstoj pri Praha.

INFORMOJ de Danziga Esp. Asocio. Aprilo.

En germana lingvo kaj Esperanto. Hektografita.

KATALUNA ESPERANTISTO. Aprilo.

„Problemo urĝe solvota“: la esp. movado bezonas instru-
antojn. Kroniko kc.

LA MARTO. Aprilo. Kun interesaj notoj pri Praha kaj
Karlsbad (ilustr.).

LA LABORISTA ESPERANTISTO. Hannover, Germ., Aprilo.

Raportas pri novaj grupoj en Wald kaj Stuttgart kaj
pri organizotaj grupoj en Traunstein, Straubing kaj Frei-
burg. Kun literatura eldono.

LA RADIO. Marto kaj aprilo.

Maŝinskribita gazeto de Grupo Esperantista de Siedlce
(Pol.).

LA REVUO ORIENTA. Jan. kaj febr.

Interalie represo de „La relativeca teorio de Einstein“
el ET.

LA SEMISTO. Marto-aprilo. Preskaŭ ekskluzive en kata-
lana lingvo.

L'ESPERANTO. Febr.

Kun diversaj legindaĵoj. Tre interesaj la daŭrigoj de la
gramatiko de fruila lingvo kaj de artikolo: Kiel oni far-
igas grafologojn?

LITERATURO. Jan.-marto.

Kun diversaj mallongaj literaturajoj.

NOVA TEMPO. Marto-aprilo. Artikoloj: Buddha, La mal-
virta urbo, Historiaj rimarkoj el la mondlingva movado
ktp.

THE BRITISH ESPERANTIST. Aprilo.

Enhavas 4-an cirkuleron pri la 12-a Brita Esp. Kongreso
(pentekosto en Harrogate) kaj programon de la 16-a
Skota Esp. Kongreso (21. kaj 22. majo en Dunfermline).

— Raporto pri vizito de britaj esperantistoj al la nova
ĉina ambasadoro en Britio, la esperantema d-ro Welling-
ton Koo.

Anoncetoj.

RETROVINTO. Samideano ISZO BRÜLL nun loĝas en
Transilvanio, Rumanio, urbo Bănişliu.

PETO. Por propaganda parolado. Kiun mi deziras ilustri
per ekspozicio, mi bezonas materialon. Mi petas esper-
antistojn en la tuta mondo, sendi al mi esp. gazetojn kaj
naciajn gazetojn kun artikoloj pri Esperanto, esp. gvid-
librojn, malkaran esp. literaturon, ilustr. poŝtkartojn, poŝt-
markojn ktp. Mi danke kvitancojn ĉiun sendanton. — R.
Hering, instruisto, Gethren-Grimma (Saksujo, Germ.).

PROPAGANDISTOJ. Bonvolu konstante sendi ĉiujn sci-
igojn pri interesaj sport-novaĵoj de via urbo kaj de via
lando per letero por Sport-Revuo al s-ro Stef. Pedrazzini,
Locarno (Svisio).

SPORT-REVUO Redaktejo de sport-revuo (adreso: s-ro
Stefano Pedrazzini, Locarno, Svislando) serĉas en ĉiuj
landoj reprezentantojn (kollektantoj de anoncoj). Nur
kapablaj agentoj estos akceptotaj. (Referencoj estas
necesaj).

DEZIRAS KORESPONDI Aŭ INTERŝANĜI:

S-ano Fermi Urgell, str. Convento 90, Sabadell (Hispanio)
deziras korespondi kun ĉiuj landoj, tuj respondos.

Grupestro Leo Fiedler, Schillerstr. 15, III, Breslau 15, Ger-
manio, deziras por siaj 50 kursoroj interŝanĝi kun ĉiuj
landoj poŝtkartojn ilust., leterojn, poŝtmarkojn ktp. Ĉiu
ricevos tuj respondon.

S-ano Willy Küppers, Düsseldorf 113, Erkratherstr. 94,
Germ., deziras korespondadi kun ĉiuj landoj, tuj kaj ĉiam
respondos.

Kiu sendos al mi poŝtmarkojn de sia lando, ricevos mar-
kajn de mia lando. Ankaŭ mi korespondas per ilust.
poŝtkartoj. — Helmut Janda, Breslau, Germ., Gabitzstr.
125, bei Dalowski.

Rudolf Ehm, Dresden-A, Ziegelstr. 52, I, deziras kore-
sp. pri poŝtkartoj ilust. kaj interŝanĝi poŝtmarkojn;
ĉiam respondos.

Pentekoste

la anglaj esperantistoj kongresos en Harrogate,
la francaj esperantistoj kunvenos en Orléans,
la germanaj esperantistoj iros al Essen,
la belgaj esperantistoj kunvenos en Liège.

Multnombra vizito al la kongresoj pruvos al la mondo la fortan vivon de Esperanto!
Samideanoj anglaj, francaj, germanaj, belgaj, sciu vian devon!
Zorgu, ke la nunjaraj Pentekostaj kongresoj estu veraj Pentekostaj mirakloj!

Fratoj Stork & K-io Hengelo (O) Nederlando

liveras pléj diversajn

Pumpilojn

Centrifugajn Vaporturbinojn, Suker- kaj aliajn Maŝinojn.

Fabrikejo kun pli ol du mil laboristoj. — Petu niajn katalogojn kaj fotojn!
Esperanto korespondata.

— Nur petoj de gravaj firmoj estos respondotaj. —

Internacia Foiro de Breslau

Dua Printempa Foiro samtempe 52. Poragrikultura Maŝinfoiro

2.—5. Junio 1921.

Agrikulturaj maŝinoj kaj iloj; maŝinoj kaj iloj por fiŝkaptado, arbara ekspluato, ĝardenkulturo, birdar- kaj abel-bredado, ĉasadado; artefaritaj sterkajoj, semajoj; agrikultur-industriaj instalaĵoj; maŝinkonstruado kaj tekniko; konstrumetio kaj konstrumaterialo; * * * * * arto kaj armetio, internaj dekoraciaĵoj; buroaĵoj; sporto. * * * * *

Informojn donas

Breslauer Messe-Gesellschaft m. b. H.

ESPERANTO-FAKO

Breslau I, Ohlauerstr. 87.

Anoncetoj.

PAULO BALKANYI peias pardonon de ĉiuj, kiuj skribis al li, pejis de li ion ktp. kaj ne ricevis ankoraŭ respondon; ĉar pro olficeja okupado de matene je la oka ĝis vespere je la oka, li estas tro lacigita, kaj eĉ la plej necesajn esp. laborojn povas nur pene plenumi! Oni indulgu do kaj atendu, ĝis la respondo venas! Sed nur tiuj havas rajton atendi respondon, kiuj sendis respondokuponon.

INSTRUIO AŬ KONTORO. Juna litova mezlerneja instruistino (esperantistino), dezirante perfektigi en uzado de germana lingvo, volas pasigi 2-3 somerajn monatojn en Germanio aŭ Svisio. Povas instrui litovan, latinan aŭ rusan lingvon, korespondadi en ili aŭ okupiĝi en kontoro. Proponojn adresu al: J. Mačernis, Kaunas, Ukmergės pl. 45, Litovio.

POŝTKARTOJ montrantaj la plej famajn polajn poetojn, muzikistojn, pentristojn, kiel Mickiewicz, Slowacki, Chopin, Moniuszko, Paderewski, Matejko kaj multajn aliajn, des pli valoraj ĉar ili parte montras nacian vestaĵon, riceveblaj ĉe POLA ESP. SERVO, Bydgoszcz (Polio), Podgorze 17. Prezo por unu serio (12) 2 resp. kup. aŭ du Esp. insignoj. Same ricevebla la popol-kanto „Kiu sin donos“ de la fama verkisto pola Jan Kochanowski, maistre tradukita de Bruno Kuhl, kun melodi-aldono. Prezo por serio kiel supre. Ilustr. gvidilo tra Bydgoszcz 1 resp. kup.

SIGELMARKOJ, INSIGNOJ KTP. Unua Viena eldonejo de esperantaj propagandaj sigelmarkoj kaj insignoj, Jozefo Kocourek, gravuristo, petas konatojn kaj interesulojn por interrilato, ĉar mi jam hejmevenis el rusa militkaptitejo, Wien X/8, Arthaber-Platz 3-14. Postulu specimengaron kontraŭ unu respond-kuponon.

DEZIRAS KORESPONDI AŬ INTERSAŜIGI:

Bahia Blanca (Argent. Sud-Ameriko). s-ro Alfonso Fuentes, str. O'Higgins 80-90, Tienda „La Capital“, deziras korespondadi kun samideanoj ĉiulandaj.

S-ro Zoltano Váray, universitato en Targu-Mureș, strato Kemény Zs. 6a (Rumanio), deziras interŝanĝi poŝtmarkojn, kolorigitajn urbvizitaĵojn, hungarajn artajn kartojn, foto-grafiajn, interŝanĝi sian portreton. Poŝtmarko bildflanke! Tuj respondos.

F-ino Asta Friedrichs, stud. rer. pol., Düsseldorf (Germ.), Gartenstr. 46, deziras korespondi per leteroj kun samideanoj en Anglujo, Usono, Danujo, Svedujo ktp., prefere kun universitataj gestudentoj.

S-ro F. Peedo-Winkel, Fontanka 27, Estokomitee, Petrograd (Rusio), interŝanĝas sovjetajn kaj estoniajn poŝtmarkojn.

M. Goldberg, Białystok, Polujo, Sienkiewicza 88, deziras korespondadi kun ĝelernantoj en ĉiuj landoj, ankaŭ interŝanĝi poŝtmarkojn kaj papermonon, kun kiu ajn. Tuj respondos.

A. Hiller, Warszawa, Polujo, Ogrodowa 26/51, deziras korespondadi pri laborista movado, komunismo, ankaŭ interŝanĝi poŝtmarkojn kaj papermonon. Tuj respondos.

Kiu bezonas bonan polan poŝtmark-kolekton, tiu povas interŝanĝi poŝtmarkojn kun mi. Mi korespondas ankaŭ pri matematiko kaj natur-scienco. Mia adreso: Lazaro Grosberg, Białystok, Polio, Jurowiecka 5.

Fraŭlino Meta Sternberg, Berlin-Pankow, Alte Schönholzer Str. 6, deziras korespondadi per poŝtkartoj kaj leteroj kun samideanoj eksterlandaj; ĉiam tuj respondos.

Poŝtmarkojn perfektajn turkajn kapitulaciajn aŭ palestinajn multfoje sendas P-ro E. Schmitz en Hafía, St. Charles, Palestino, al ĉiu sendinto iulanda de egalvaloraĵ laŭ Senf aŭ Yveri 1921.

S-ro L. Naray, Kispest (Hungario), Kossuth-Lajos-u. 30, deziras korespondi pri socialismo kaj laborista movado, per poŝtkartoj ilustr. kaj leteroj.

Ladisláwo Szilasi, Budapest V, Podmanicki-u. 75, deziras korespondi kun junuloj instruitaj, muzikemaj.

F-ino Margareto Toman, Budapest IX, Gal-u. 25-1-8, deziras korespondi kun ĉiulandaj samideanoj. Mi vendas hungarajn poŝtmarkojn, multe pli malkare ol katalog-prezoj. — Kolomano Wiesinger, Budapest VII, Wesselényi str. 30.

O. Sklenčka, Delegito de UEA, Hradec Králové

Ceĥoslovakio

peras kaj prizorgas ĉiuspacajn aferojn kaj rilatojn: komercajn, informajn, interŝanĝajn ktp.

inter fremdlando kaj Ĉeĥoslovakio.

Bonvolu uzi miajn fidindajn servojn!

Nia Firmo

komercas Formosajn specialaĵojn, produktaĵojn kaj ankaŭ negocas kiel agento komisia de ĉiuj eksterlandaj komercaĵoj. Oni korespondas Esperante.

S-ro So-Pekfui

eksportisto kaj importisto

Manka, Gekanso, Ĉusekilo 105

Taihoku, Formosa, Japanujo.

Angla kaj Esperanta Etimologio

(Angle kaj Esperante).

Verkita de Charles G. Stuart-Menteth.
(Oksforda diplomo kun distingo).

„Utala lernilo per atentigi la publikon pri multaj Esp. radikoj en ilia lingvo.“ *Holanda Pioniro*.

„Intereseĝaj tabeloj.“ *Kristana Espero*.

Prezo 10 pencoj (= 4 respond-kuponoj) afrankite.

17, Hart Street, London W C 1.

Esperanto-Verlag Berlin S 59

Friedrich Eilersiek --- Wissmann-Str. 46
(Germanujo).

Esperanto-eldonejo kaj libro-eksportejo liveras ĉiujn haveblajn librojn el Germanujo, eldonas Esperantajn verkojn kaj la gazeton

„Esperanto-Praktiko“

ĉiumonata organo por perfektigo en Esperanto.

Esperanto-Katalogo senpage, specimena numero de la gazeto kontraŭ 1 respondokuponon aŭ 1 Mk. germ.

Specialaj katalogoj pri germanaj libroj laŭ deziro.

Brazilio!

Sinjoro J. BLOOMFIELD, komisiisto, deziras reprezenti eksterlandajn firmojn.

Adreso: Strato Rosario, 152, 1-a etaĝo, RIO DE JANEIRO, Brazilio.
Telegrafa adreso: TATU.